


Julio 2002

QUANCO

3/02

OFICIALA ORGANO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO



Oficiala Organo de
Kuba Esperanto-Asocio
(3/2002)

Aperas 4-foje jare

Eldonas:
Kuba Esperanto-Asocio
Poŝtfako 5120,
10500 Havano, Kubo
Telefonoj: ++53(7)53 9102
kaj 40 4484
Fakso: 33 8729
Retadreso:
kubesp@enet.cu

Ĉefredaktoro:
ALBERTO GARCÍA FUMERO

Revizias kaj kontrolas:
MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

Enpaĝigo:
ALBERTO GARCÍA FUMERO
ALBERTO FDEZ-CALIENES BARRIOS
ROBERTO MOLINA GÁLVEZ

Prezo: (enlande) CUP 1.00
(eksterlande), EUR 2.00
aŭ 2 irk., pagendaj al la
UEA-konto: keax-u.

Ĉiuj rajtoj rezervitaj
Reproduktado permesata
(bv. indiki la fonton kaj
sendi du ekzemplerojn al
la Redakcio).

Interŝanĝo dezirata.

La kovrilo:

Antaŭ la inaŭguro de Esperanto-fako en la Municipa Bibliotoko de Santiago de Cuba la partoprenantoj metis florkronon ĉe monumento al la herooj de la Revolucio.

Foto: Arkivo de KEA.

estimataj

Kvankam la finpretigo de ĉiu numero de Avanco kutimas esti kaprompo pro la ĉiama tempomanko, ĉikaze ĝi estis plezuro... Eble mi estas tro naiva kaj revema, sed mi konfesas, ke sciinte pri la gravega atingo de la santiagaj samideanoj mi ĝojsaltis. Ne, mi ne anoncos al vi la atingon ankoraŭ... legu mem.

Plie, (kaj plue) PIVuilo helpas nin kompreni la diablajn enigmojn de la uzado de po, Tineo memorigas nin pri la riĉaĵoj ekzistantaj en nia biblioteko, Juliano informas pri la sukcesa Tria Nacia Infanrenkontiĝo, delonge ŝuldata konversacio kun Martín Castro aperas sur niaj paĝoj, Maritza rakontas pri la UK... nu, kio mankas? Eĵ, Calienes atentigas min pri la spaco, do mi metos punkton finan ĉi tie...

Plezuran legadon!

Via ĉefredaktoro,
Mag. ALBERTO GARCÍA FUMERO

enhavo

Brazil' por mi... MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ	3
Parolas Havano... MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ	5
Polemike: Pri la faka agado en KEA MANUEL O. RODRIGUEZ	6
Santiago de Cuba: Jes! Esperanto-fako en la Municipa Biblioteko JUAN RAMÓN RODRIGUEZ GOMEZ	7
Organizo de la internacia E-movado (2a parto) MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ	8
Inter la infanoj en Guantánamo JULIÁN HERNÁNDEZ ÁNGULO	10
Vidalvide kun... Martín Castro ALBERTO GARCÍA FUMERO	11
El nia biblioteko: Ĉu legi aŭ ne legi? ALBERTO GARCÍA FUMERO	14
Angulo de la duboj: Po-emo ALBERTO GARCÍA FUMERO	15



87-a Universala Kongreso

de Esperanto

Fortaleza, 3-10 de aŭgusto 2002

Brazil' por mi...

Kongresi denove en Ameriko estis refrėŝiga sperto por la internacia esperantista komunumo. Post la sperto de la UK en Havano en la jaro 1990, la plej grava internacia renkontiĝo de la esperantistoj trairadis diversajn eŭropajn kaj ankaŭ aziajn landojn, do, reveni al tiu ĉi flanko de la Atlantiko estis unika ŝanco kiu kunportis al ni la etoson kaj kadencan de niaj amerikaj fratoj.

La kongreso okazis en la apudmara urbo Fortaleza, en la norda parto de Brazilo, kie ariĝis iom pli ol 1480 esperantistoj el 58 landoj sub la kongresa temo **Diverseco – ŝanco, ne minaco**, tamen ni kubanoj, alvenis iom pli frue kaj engaĝiĝis en la laborteamo de la LKK kiel parto de la tuta skipo.

Entute kvar kubanoj partoprenis la kongreson. Nome Francel Briel danke al sub-



Sur la foto, de maldekstre, komitatanoj prof. Humphrey Tonkin, s-ino Michela Lipari, prof. s-ro Lee Chong-Yong, d-ro Renato Corsetti (Prezidanto de UEA), s-ro Ivo Osibov, s-ino Ans Bakker-ten Hagen kaj Ĝenerala Direktoro s-ro Trevor Steal.

KONGRESA REZOLUCIO

La 87-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Fortalezo (Brazilo) de la 3a ĝis la 10a de aŭgusto 2002 kun 1484 partoprenantoj el 58 landoj, kun la temo "Diverseco – ŝanco ne minaco",

Konstatas, ke la daŭranta integriĝo tutmonda kondukis al pozitivaj rezultoj, ekzemple internaciaj instrumentoj pri homaj rajtoj, sed ankaŭ al malegalecoj kaj al la ĉiam pli rapida perdiĝo de malgrandaj lingvoj kaj kulturoj,

Gratulas UNESKOn pro ties agado sur la kampo de lingva kaj kultura diverseco, ekzemple per la Tago de la Patrina Lingvo je la 21a de februaro ĉiujare, kaj aparte bonvenigas, ke la Ĝenerala Konferenco alprenis je la 2a de novembro 2001 Universalan Deklaracion pri Kultura Diverseco,

Konstatas, ke la principoj kaj celoj de UNESKO en tiu kampo kongruas kun la idealoj de la movado por Esperanto, kiu celas per neŭtrala komunikilo transporti la kulturojn, tiel kreante forumon por egaleca intersanĝo de kulturaj valoroj,

Atentigas en tiu kunteksto pri la graveco de la lingva dimensio de kultura diverseco, kaj substrekas la pretecon de la Esperanto-movado kunlabori kun ĉiuj organizaĵoj, kiuj okupiĝas pri la kultura dimensio en internaciaj aferoj.

teno de la Yumeiha organizaĵo kontribuis al la kongresa programo per la sesioj de yumeiha terapiro; Marta Alonso danke al subteno de brazilaj esperantistoj kunlaboris en la instruado kun brazila esperantistino kies laboro estis rekonita de UEA dum la kongreso, ŝi ankaŭ laboris dum la kongresa semajno en la ĝiĉeto de ekskursoj; aliflanke, Gonzalo Collantes, prezidanto de KEA-filio en Santiago de Cuba, danke al subteno de la Amerika Fondado same partoprenis kaj kunlaboris en la Libroservo de UEA kaj la Amerika Budo. Komprenoble, ankaŭ mi kunlaboris en la disdonado de dokumentoj, esence dum la unua kongresa tago kaj krome, partoprenis en la labor-sesioj de la Komitato de UEA, Tago de la lernejo kaj ILEI-ekzamenoj, samtempe laboris por la Esperanto-elsendoj de Radio Havano.

La kongresan temon gvidis geprofesoroj Humphrey Tonkin kaj Jane Edwards, kiuj en sesioj laborigis grupojn pri diversaj tiklaj demandoj kadre de la ĉefa temo. Bedaŭrinde, la kongresa rezolucio kiu rezultis el tia diskuto ne vere estis kontentiga por ĉiuj partoprenintoj kaj ofte la tempo ne sufiĉis por funde tuŝi kelkajn erojn, tamen, oni povas kompreni ke la movado estas tiel heterogena, ke malfacilas respeguli en kongresa rezolucio temojn tiel tiklajn kiel subpremo kontraŭ la palestinaj lingvo kaj kulturo, kio ja restis en la sento de pluraj partopreninoj en la debatoj. Tiaj diskutoj ja estis bone reĝisoritaj de la gvidantoj por ne fali en politikaj kvereloj kiuj povintus malutili al la celo de la laborgrupoj.

Aparte interesaj ankaŭ estis la Tago de la lernejo, kiu dum pluraj horoj estis dediĉita al variaj temoj kiaj la spertoj de la brazila

profesoro Sylla Chaves pri laboro plurjara en la instrua kampo kaj diversaj materialoj de li kreitaj tiucele: ni ankaŭ konis pri la projekto Espero en Afganio laŭ raporto de Atilio Orellana, interalie.

La kultura kaj turisma programoj estis tre ŝatataj de la kongresanoj tiel ke Brazilo prezentas tre riĉan kulturen varion kaj turismajn allogojn.

Ni aparte ĝuis la fratecon de niaj brazilaj samideanoj kun kiuj ni dividis kaj gastejon

kaj laborhorojn. Ili montriĝis tre interesitaj pri niaj lando kaj movado kaj donis al ni la eblecon konatiĝi kun tia kulturo kaj lando.

Evidente, unu el la plej belaj momentoj okazis dum la inaŭgura ceremonio kiam ĉiuj kongresanoj kunkantis – danke al granda ekrano kie legeblis la teksto – tiun simbolan, faman kanzonon "Akvarelo de Brazilo". Estis ja emociiga momento neniel forgesbla por la partoprenintoj de la 87a UK: brazil', brazil', por mi... MARITZA GUTIÉRREZ

Parolas Havano...

Ĉi-septembre la Esperanto-elsendoj de Radio Havano Kubo atingis sian 14an jaron la 11an de septembro kaj sendube temas pri ne forgesinda okazaĵo! Tio signifas ke dum tiu ĉi tempo nia lando restis kiel la sola elsendstacio en la kontinento, kiu utiligas Esperanton kiel laborlingvon por kiu ajn celo radiofonia. Menciendas, ke dum la lasta jaro nia voĉo daŭre disaŭdigis sian amikan mesaĝon per la tradiciaj mallongondaj elsendoj kaj ekkomencis elsendi ankaŭ pere de **Real Audio**, aparte menciendas la kunlaboro starigita ekde januaro kun la Esperanto-fako de Aŭstria Radio kiu elŝutis nian interretan elsendon kaj disponigis ĝin al la interesitoj pere de sia propra servilo. Tio sendube multe kontribuis al la ampleksigo de nia horizonto rilate aŭdeblecon, tamen, jam estis anoncite ke ekde oktobro la aŭstria Esperanto-elsendoj ĉesos pro organizaj kaj financaj kialoj. Nu, tio ja konsistigas pardon por la tuta aŭskultantaro kaj de Aŭstria Radio kaj de la havanaj elsendoj, sed plej taksindas la kunlaboremo de niaj aŭstria kolegoj, speciale de ties redaktorino Katinjo Fetes-Tosegui kiu disponigis tian servon al ni.

Nuntempe niaj geamikoj povas daŭre aŭdi nin per **Real Audio** ĉiudimanche je la 15a horo UTC en la jena adreso: <http://216.138.240.229/rc4>

Ni petas al ĉiuj sendi komentojn kaj korespondaĵojn ankaŭ per la reta adreso de Radio Havano: radiohc@enet.cu

Niajn validajn frekvencojn per mallongaj ondoj, ĉiam en dimanĉoj, vidu sube.

Ni atendas viajn leterojn kaj informilojn! Radio Havano Kubo, Pf. 6240 Havano, Kubo.

Maritza Gutiérrez
La redaktorino

Horo UTC	metroj	frekvencoj	Regiono
07.00-07.30	31	9820	Okcidenta Nordameriko kaj Pacifika Azio
15.00-15.30	25	11760	Tuta Ameriko kaj Karibio
19.30-20.00	21	13715	Mediteranea Eŭropo
22.00-22.30	21	13715	Mediteranea Eŭropo
23.30-24.00	25	11760	Tuta Ameriko kaj
	49	6070	Karibio

Pri la faka agado en KEA...

Faka agado estas unu el la plej gravaj agadoj de esperantistoj ĉar nur pere de ĝi oni povas vere pruvi ke Esperanto aplikiĝas al ĉiuj sferoj de la homa vivo.

Unuvorte, nia celo ideale estu ĉiam instigi la kreadon de fakaj grupoj...

Sed por la organizado de fakaj krupoj bezonate estas unue krei socian etoson, ĉar alikaze la kunsidojn de tiaj grupoj turniĝas en tedajojn. Ankaŭ: fakgrupoj devas havi gvidantojn, kiuj kompreneble devas esti "guruoj", spertuloj pri la afero. Tute ne validas simpla entuziasmo.

Kion faru tiaj grupoj? Nu bone, simple periode kunsidi por diskuti, babili, prelegi, kunordigi, ktp. pri la laboro de la faka grupo. Ho, jes, sed kreive...

Sed ĉu la afero estu nur inter esperantistoj? Kial ne ampleksigi la rondon?

Eblas kaj estos pli bone, ke tiuj fakuloj prelegu inter si kaj eĉ invitu nefakulojn kaj fakulojn neesperantistajn. Tiamaniere ni riĉigos la aranĝojn, pliklerigos niajn samideanojn kaj samtempe montros al la "ekstera" mondo, ke Esperanto ne estas afero nur por esperantistoj.

Jen la kerno. Esperanto estas ilo kaj ideo, ne nur lingvo.

Nuntempe en la sino de KEA oni tuj povus krei la sekvajn fakajn grupojn:

1. Verkista faka grupo (verkistojn ni ja havas!)
2. Artista faka grupo (same)
3. Instruista faka grupo (simile al ILEI... sed funkcianta)
4. Kuracista faka grupo (simile al KEMA... sed funkcianta)

5. Turisma faka grupo (la funkcianta, nuntempa KEATUR)
6. Manfarista faka grupo (iom pli estonta, sed ebla)
7. Tradukista faka grupo (preskaŭ ĉiuj niaj verkistoj tradukas!)
8. Faka grupo de komputilistoj (retlisto jam ekzistas!)
9. Ĵurnalista faka grupo (kial ne kunigi ilin?)

KEA havas potencialon kaj sperton inter ĝia membraro por la organizado de tia laboro.

Mia komentario pri la temo celas "movi la cerbon" de niaj esperantistoj kaj levi la animon. Polemike? Jes, sendube. Oni respondos al mi, ke jam ekzistas "Faka Agado" en nia strukturo. Sed ni ne sufiĉe ekspluatas ĝin, miaopinie...

La polemiko estas malfermita. Mi dankas vin pro la legado de miaj komentarioj kaj atendas viajn kriteriojn.

MANUEL O. RODRIGUEZ

Noto de la redakcio:

Manolito jam al kutimigis nin de sufiĉe da tempo al polemikaj temoj kaj opinioj. Ĉikaze li tuŝas unu el la plej gravaj sferoj de nia agado. Oni povas konsenti aŭ malkonsenti, sed kio ne eblas, estas resti indiferenta...

Nu, bone, la ganto estas ĵetita...

Kiu prenos ĝin?

Santiago de Cuba: Jes, Esperanto-fako en la Municipa Biblioteko!

Revo delonge ekzistanta inter la esperantistoj en Santiago de Kubo realiĝis per inaŭguro de Esperanto-fako en la Municipa Biblioteko Abel Santamaria, la 16an de junio, okaze de la 23a Datreveno de KEA.

La tiea grupo okazigis oficialan malfermon, kiun ĉeestis funkciuloj de la Ministerio pri Kulturo kaj Justico, plus dekoj da esperantistoj, ne nur de tiu provinco, sed ankaŭ de Guantánamo, Urbo Havano kaj la Estraro de KEA.

Elstaraj eroj de la kleriga aranĝo estis la arta prezentado de soprano Cristina Delisle kaj aktorino Georgina Almanza, kiuj plezurigis la ĉeestintojn per esperantigitaj kanzonoj kaj poezioj; la gitarludado de Julián Hernández, kiu kantis tre konatajn kanzonojn originale verkitajn de li en la internacia lingvo; kaj aliaj artaĵoj prezentitaj de esperantistoj el Santiago.


Grava momento, estis ankaŭ la parolado de Juan Ramón Rodríguez, kiu sinteze historiumis pri la poresperanta agado en tiu provinco ekde la komenco mem de la 20a jarcento. Santiago nuntempe agas ne nur por la hodiaŭa plifortigo de la movado, sed ankaŭ turnas la vizaĝon al la estonteco, ĉar tiu ko-

lekto da libroj kaj esperantajj metitaj je la dispono de la ĝenerala publiko garantias la pluekziston de la E-movado tie.

Ekde nun, ĉiu uzanto de la biblioteko interesiĝanta pri Esperanto, havos la eblecon konsulti ampleksan bibliografion tiurilatan, aŭdi muzikon, legi hispanlingve pri ĝi kaj (kompreneble!) kontakti esperantistojn.

Fine de la aranĝo, Emilio Mendoza, funkciulo de la Ministerio pri Kulturo kaj surloka reprezentanto de la provinca direktoro pri tiu fako, anoncis la decidon "esperantistigi" bibliotekistaron, por ke ŝi rekte atentu la publikon, informu pri Esperanto kaj kontrolo la materialojn donacitajn de la filio, la centra biblioteko de KEA kaj privatuloj, kaj pliriĝenda per estontaj kontribuoj.

JUAN RAMÓN RODRÍGUEZ



La novaj materialoj alliras la atenton. Foto: Arkivo.

Organizo de la internacia E-movado

Nuntempa situacio

(Parto 2a)

En la antaŭa numero de Avanco ni prezentis la unuan parton de tiu ĉi temo, kiun ni konsideras utila por niaj esperantistoj tra la tuta lando, pro tio ke ĝi konsistigas parton de la historio kaj evoluo de la internacia E-movado. Ni esperas ke niaj legantoj utiligos ĝin por ke la novaj esperantistoj havu pliajn konojn pri movado al kiu ili mem nun apartenas.

La unua UK 1905

Zamenhof mem restis fidela al sia gvida ideo, ke la progresigo de Esperanto ne devas esti ligita al unu persono, sed al "institucio libere elektata de la esperantistaro mem". Inter multaj projektoj de organizo, kiuj estis en la tagordo de la unua UK en Bulonjo sur Maro, estis ankaŭ la propono de Zamenhof krei Tutmondan Ligon Esperantistan, gvidatan de dudek kvin-persona Centra Komitato kaj konsistanta el specialaj komitatoj agada, lingva, kongresa, cenzurista kaj ekzamena.

La parizaj eminentuloj reagis malfavore al tiu projekto pro timo al ies persona regado de la movado. Konsekvence, rilate al la organiza demando, la rezultoj de la UK estis magraj. Tamen, ĝi markis la eniron en internacian periodon, unuafoje demonstris parolan uzon de la lingvo inter diversnaciaj kaj multe kreskigis la entuziasmon. Kreiĝis Lingva Komitato, elektita de Zamenhof kaj konfirmata per voĉdono de la kongresanoj, kaj la kongresa estraro estis komisiita organizi ankaŭ la venontan kongreson en Genevo.

Dum la malferma parolado al la kongreso, Zamenhof komprenigis ke la interna ideo estas io pli ol nedifinebla mistiko kaj poresperanta instigilo, kio kaŭzis grandan suspektemon ĉe la francaj raciistoj kaj aliflanke oni trovis necesa kontraŭagi al la vaste reganta antipatio al la rolo de la eldonejo Hachette, la kongreso akceptis oficialan difinon de la Esperanto-Movado, la faman "Deklaracion pri Esperantismo", kiu konfirmas la neligiĝon de Esperanto al iu persona leĝodonanto. Ĝi restas valida ĝis hodiaŭ.

Depost Bulonjo ĉiujare okazis la UK-oj en atmosfero de senlima entuziasmo, kanto de la himno kaj admira aŭskultado al la vortoj de Zamenhof. Oni propagandis la lingvon kaj ties internan ideon, kio ja ebligis la sindediĉan laboron de multaj esperantistoj. Tamen restis organiza vakuo, kiun klopodis plenigi Generalo Sebert konsekvence subtenata de Zamenhof. Tuj post la Bulonja kongreso li transformis la estraron de la kongresaj kunsidoj en Organizan Komitaton, paralelan al la Lingva. Por ambaŭ komitatoj ekfunkciis Esperantista Centra Oficejo en Parizo (1906). Ĝi estis pure privata kaj nur teknika sekretario, finance vivtenata de Sebert kaj lia amiko Javal kaj neniel rajtigita de kongresa decido aŭ de la naciaj societoj. Pro la ĝenerala opo-nemo al kia ajn anonima aŭtoritato, Zamenhof precizigis ke la CO "volas ne direkti kaj regi, sed nur informi kaj servi". Tiun taskon ĝi bone plenumis dum kelkaj jaroj. Sebert fondis la esperantistan dokumentaron, ro-gule eldonis raportojn kaj protokolojn kaj

lanĉis en 1908 la *Oficialan Gazeton Esperantistan*. Laŭ statistiko de la CO, en 1906 estis 434 registritaj societoj kaj tiu nombro rapide kreskis: 756 fine de 1907 kaj 1266 en 1908.

Ido-skismo kaj stabiligo de Esperanto

Pli kaj pli oni eksentis ke esperanto bezonas organizigon, se en ĝi povus malproksimiĝi de la mondo reala. Tiusence franca esperantisto nomata Alphonse Carles proponis nomi en multaj landoj *konsulojn* al kiuj oni povus peti sciigojn kaj informojn pri komercaj aferoj, ktp. Anstataŭ Tutmonda E-Ligo, laŭ li, "sufiĉus krei centran konsulejon". La kongreso principe aprobis la ideon, rekomendante al la lokaj grupoj fondi tiajn esperantistajn konsulejojn, sed oni tute malatentis ke por tio necesus speciala organiza centro.

Alfred Michaux (1859-1937) batalis senlace por organizigo sur kvazaŭ parlamenta organiza centro. Li estris la bulonjan grupon.

Zamenhof konfirmis en 1907, ke organizajon por la esperantistaro li daŭre opinias necesa, sed pro la obstina opozicio de Cart kaj De Beaufront li ne volas enmiksiĝi en la diskutojn. Do, la diskutoj kondukis al neniu konkreta rezulto kaj Zamenhof direktis sian atenton denove al eksteraj instancoj por ricevi internacian apogon al Esperanto. Kun la nova jarcento komenciĝis por Esperanto periodo de publika atento.

La Delegacio por Alpreno de Lingvo Internacia estis iniciatita en 1900 de la francaj profesoroj Louis Couturat kaj Leopold Leau; al ĝi aliĝis pli ol 300 societoj kaj pli ol 1000 sciencistoj kaj plej vikle subtenis ĝian programon la esperantistoj. (Ne estis nur esperantista).

En 1907 Couturat kaj Leau formis dekdu-membran Komitaton, lia kun lingvistoj Jes-

persen kaj Boudouin de Courtenay por decidi pri la problemo de mondlingvo, pri kiu Internacia Asocio de la Akademioj deklaris sin nekompetenta. Zamenhof avertis ke tia komitato enhavos ian aŭtoritaton antaŭ la okuloj de la mondo, tamen, De Beaufront promesis helpon al Couturat kaj partoprenis la kunsidojn kiel komisiito de Zamenhof.

La Komitato rekonis la kvalitojn kaj praktikajn servojn de Esperanto, sed samtempe deklaris ke iuj reformoj estas necesaj. Couturat submetis projekton Ido, kiu konsideris la proponitajn ŝanĝojn en la strukturo, gramatiko kaj vortaro de Esperanto kaj estis – je konsterniĝo de la esperantistoj – defendata de De Beaufront, kiu antaŭe parolis favore al E.

Fine la Komitato "alprenis principe esperanton" kondiĉe de iuj ŝanĝoj kaj intertraktoj kun la Lingva Komitato pri la eventualaj modifoj. Naskiĝis baldaŭ akra polemiko kaj en januaro 1908 evidentiĝis ke la Lingva Komitato estas kontraŭ plua traktado kun la Delegacio. Ankaŭ Zamenhof devis anonci la ĉesigon de rilatoj kun la nomata Delegacio dum kreskis inter la esperantistaro la maltrankvilo kaj indigno pri la reforma diskuto. Sendepende de la starpunktoj de la gvidantoj, la esperantistaro elmontris sian potencon.

Tiu ĉi krizo estas konata kiel Ido-krizo kiu kreis skismon en la movado, sed ĉefe inter la gvidantoj el kiuj 20% transiris al Ido, dum inter la simplaj esperantistoj nur 3-4% transiris al Ido.

Nu, Esperanto pruvis dum tiu krizo ke el artefarita lingvo ĝi trapasis en formon de viva lingvo kaj forte enradikiĝis en homa kolektivo, kiu komprenis la neceson de disciplino kaj absoluta unueco, laŭ Zamenhof, antaŭkondiĉoj por progresigo de la lingvo.

(daŭrigota)

Inter la infanoj en Guantánamo

Iom ekster la urbocentro, ĉirkaŭita de verda kaj trankvila pejzaĝo, staras la arta mezlernejo de Guantánamo, kie pli ol kvardeko da infanoj el Holguín, Camagüey kaj Guantánamo renkontiĝis ĝoje por okazigi la Trian Nacian Infanrenkontiĝon. Kantoj, poemoj, rakontoj, skeĉoj kaj alispecaj eroj vivigis la renkontiĝon ekde la Interkona Vespere, kio multe stimulis kaj la infanojn kaj la plenkreskulojn ĉeestantajn.

Antaŭe al mia vojaĝo, iomete influita de kelkaj opinioj, mi ade pensis kaj demandis min ĉu valoris la penon organizi tian eventon, kiu postulas multe pli da energio, laborotempo, zorgemo kaj detaloj ol la aliaj kaj dum mia tritaga restado inter la infanoj, mi konstatis ke tiuspeca renkontiĝo ja valoras pro la fakto, ke ĝi unue montras laborrezulton de serioza kaj persista agado kun la infanoj flanke de entuziasmaj esperantistoj-instruantoj kiujn la asocio havas. Jen la ĉefa celo. Due ĉar tiel oni iel aliel oni povas esperantigi kelkajn infanojn, si oni vere motivigas ilin, kiuj puŝos la ĉaron kune kun ni dum venontaj jaroj kaj trie ĉar la esperantista laboro kun la infanoj edukas ilin kaj okupas ilian liberan tempon.

Mi povis konstati ke Esperanto malfermas novan horizonton al infanojn kun diversaj familiaj kaj sociaj problemoj kio helpas ilin konduti pli bone. La agado de Raymond Fonseca kun la infanoj de sia lernejo en Holguín kaj tiu de la Guantánamo-teamo kun la infanoj de kvartalo kun sociaj problemoj ekzempligas tion.

La renkontiĝo ne nur okazis inter la muroj de la arta lernejo ĉar sabate posttagmeze la etaj esperantistoj iris distri sin en riveron apud la urbo kaj vespere prezentis varian kaj buntan programon en subĉiela teatro, filmita de la provinca televidstacio, kiun ĉeestis esperantistoj de la filio, gepatroj kaj ĝenerala publiko.

Dimanĉe matene, post la prezentado de la provinca pupteatra ensemblo "Guiñol" kaj post spekti la filmon *Mazi en Gondolando*, okazis la distra programo kie oni elektis per balotado la stelulinon kaj kavaliron de la renkontiĝo kaj donacis premiojn meze de esperantista etoso ornamita de la arta talento de la ĉeestantoj. Menciindas la partopreno de la infana muzikensemblo "Changüi" kaj ties direktoro.

Bedaŭrinde, la renkontiĝo ne estis vere nacia ĉar infanoj de aliaj provincoj ne iris pro diversaj kialoj siamomente analizindaj kio tamen ne nebuligis la brilon de tiuj tagoj.

Ĉiel, ĉiu komitatano kiu ne sendis delegacion devos pensi kaj eklabori de nun tiel ke estontece aŭdiĝu la infanvoĉoj de sia provinco kiel rezulto de laboro farita tiukampe. Dankon al Dayamí, Elizabeth kaj Raymond, al Camagüey kaj Holguín kaj aplaŭdojn por Raulito, Cutiño, Leonardo, Tirso, Tania kaj ŝia edzo, Julita, Tata kaj ŝia edzo kaj la aliaj kiuj multe, ame kaj teame laboris por donaci al la infanoj kaj al la asocio sukcesan kaj memorindan renkontiĝon.

JULIAN HERNÁNDEZ

Ana, nia junulino kara...

Tiun kanzonon estis mi fajfanta tiumatene. Malgraŭ la problemoj transportaj, ni sukcesis alveni ne tro malfrue ĉe Martín. Ho jes, kompreneble, vi ne scias ankoraŭ, sed mia celo estis intervjui lin. Martín Castro López, mi celas diri, nia dum multaj jaroj estrarano pri Kulturo. Jen kial mia edzino Mayra kaj mi eniris "kamelon"* plenplenan en tiu varmega dimanĉa mateno. Martín Castro estas fondinto de KEA kaj unu el la plej popularaj figuroj de nia movado dum multaj jaroj. Nuntempe, iom flanke de la ĉefa fluo de nia movado pro personaj kialoj, kvankam ankoraŭ instruanta Esperanton (pli ol 10 jaroj!), kaj partopreninta la lastajn naciajn kongresojn, li afable pretiĝas rakonti al ni aferojn, kiuj konsistigas gravan parton de lia vivo.

Super bonega kafo, preparita de Maritza, lia edzino, la afero glate iras, kvankam li tremetas je la ideo esti intervjuata:

– Nu, unu demando ĉiam venas la unua: kiel vi eksciis pri esperanto?

– Estis mi, kiu sciigis lin – respondas el la kuirejo Maritza – mi alportis ĵurnalon enhavantan la novaĵon. Tiam li estis lernanta la anglan.

– Jes – kompletigas la informon Martín – Ni ambaŭ enskribiĝis. La kursojn ni finis en la jaro '81.

– Kaj jam de la komenco li instruis.

– Jes, mi estis lernanto de la dua nivelo, dum mi instruis la unuan. En tiaj tempoj la lernejestro estis Piñera.* Ni ĉiuj aperis en la vidbendo *Esperanto* filmita en 1987, ĉu

vi memoras?

– Jes, tre bona videofilmo – respondas mi. Kaj la nacia televido jam estas prezentinta ĝin plurfoje. Eĉ pasintjare... Poste vi eĉ fariĝis lernejestro, ĉu ne?

– Jes, ankaŭ. Plurjare. Tiam ni instruis en la limgolernejo Abraham Lincoln. Lernanto mia estis Alexis,* en la ĝermaj tempoj de Moncada*. Dario estis la grupestro...

– Ne diru!

– Ili partoprenis plurajn aranĝojn. La afero kulturo estis tre vigla tiam. Tio eĉ estigis por mi kelkajn problemojn hejmajn, ĉar kelkfoje mankis al mi tempo por atenti mian familion...

Afabla grumbleto venas el la kuirejo. Ni ĉiuj ridetas.

– Jes, mi komprenas – diras mi –. La samo estas okazinta ankaŭ al mi...

Mia edzino kapjesas.

Dume Mayra kaj Maritza babiladas pri tio kaj alio, kaj aperas ekzemplero de la buite-no "Angerona", presata de la Havana Kultura Oficejo kaj kunredaktata de Maritza. La enhavo estas tre interesa (unu el la artikoloj rakontas pri kurioza testamento dediĉanta monsumon al la unua, kiu sukcesos vojaĝi al planedo, kondiĉe ke ĝi ne estu Marso) kaj ni paŭzas. Alvenas plia kaftaso. Martín rekaptas la fadenon de la rememoroj:

– En tiaj tempoj la fakestro pri la angla, S-ro Pelayo, ankaŭ instruis Esperanton...

– Tio ne estas ofta afero, ĉar fakuloj pri la angla kutime ne interesigas pri Esperan-

to – diras mi. Escepto estas Julián Hernández, nia eksprezidanto. Li estis dum jaroj fakulo en la Ministerio pri Edukado. Sed homoj larĝmensaj ĉiam alvenas al la internacia, ĉu ne? Nu, bone, vi lernis kaj la anglan kaj la italan. Ĉu Esperanto helpis Vin pli facile lerni?

– Jes, la italan mi lernis post la internacia, kaj mi konstatis tion.

– Bone. Plurakontu...

– Dum kelkaj jaroj ni instruis tie. Poste ni translokgis la E-lernejon al la adreso Línea kaj G.

– Vi estis daŭre la lernejestro, ĉu ne?

– Jes. Eble interesos al vi scii, ke lernantoj miaj estis ankaŭ Manolito kaj lia edzino Felicia.*

– Kaj mi ricevis lecionojn de Juan Lázaro Besada. Nu, eble ni devos rimarkigi, ke ni estas ankoraŭ sufiĉe junaj. Alikaze la legantoj pensos pri esperantaj fosilioj... – opinias mi. Nur okazas, ke tiam ni estis eĉ pli junaj...

– Martín, kiam vi eniris la Nacian Estraron?

– En la jaro 1981. Mi ekde la komenco estis aktivulo pri kulturo en la lernejo ĉe strato Escobar. Kaj nu, bone, mi do atentis pri kulturo. Tiam ni havis teatran trupon, ses-homan. Aĥ, tiaj tempoj... mi zorgis pri Kulturo ĝis 1997, kiam mi alfrontis problemojn. Jam mi estis perdinta mian laborpostenon dum la restrukturigoj laboraj kaj devis serĉi alian vivrimedon.

– Esperanto estis iel kaŭzo, ĉu ne?

– Nu, bone, mi estis devigita peti forpermeson sufiĉe ofte, kaj kompreneble tio influas... sed mi preferus paroli pri pli agrablaj aferoj.

– Vi estas dirinta ankoraŭ nenion pri viaj kanzonoj. Ĉu estas vero, ke vi ne kapablas krei kanzonojn en la hispana, kaj nur en la internacia?

Li ridetas.

– Jes, ĝis nun.

– Ekzistas kasedo enhavanta kanzonojn kaj originalajn kaj tradukitajn, *Pensi kaj ami Esperante*. Oni ĉiam rememoras vin kantanta kune kun Julián. "Ana, nia junulino, kara" estas de ni ĉiuj konata...

– Jes, li kaj Consuegra entuziasmigis min. Mia unua kanzono estis "Infano", kaj mi registris ĝin danke al la instigo de María Álvarez Ríos.

– Plurakontu!

– Mi komencis tradukante por boleristoj el Quijicán, Bauta, Bejucal... poste mi inspiriĝis – ridetas li.

– Oni devas ankaŭ menciigi, ke nuna simbolo de KEA estis desegnita de vi. Kaj ankaŭ estis vi tiu, kiu demarŝis pri la esperanta memortabulo ĉe Lonja del Comercio.

Vi estas tuŝinta sufiĉe da flankoj de nia movada aktivado. Nu, tempo flugis! Jen la lasta demando: kiu estas via plej bela rememoro ligita al Esperanto?

Li pensas. Nur iomete.

– Roterdamo '88, mia unua (kaj ununura





Kantas Martin Castro. Gilare akompanas Julián Hernández.

Ĉu la duopo kiu tiel brile etosisis la renkontiĝojn dum la 80aj jeroj iam ree prezentiĝos? Foto: Arkivo.

eksterlanda) UK. Kiam vi konstatas, ke en vero Esperanto funkcias, estas grandioze... kaj ankaŭ ni vidis tiom da kuriozaĵoj... la makedo de la urbo, antaŭ kiu ni strebis eltrovi la sidejon de UEA, ekzemple. La sukcesa prezento de Miriam Ramos.*

Ĉu vi imagas nin en la pinto de turo Euro-mast revante pri "nia" UK en 1990?

Camello: Buso kies formo iel memorigas pri kamelo.
Piñera: Andrés Piñera, plujara oficisto, instruisto kaj estrarano de KEA.

Moncada: Populara kuba muzikgrupo.

Alexis: Alexis Otero, konata aktivulo kaj iama estrarano de KEA, nuntempe loĝanta en Svislando.

Manuel Rodríguez kaj Felicia Rosé: Konataj havanaj geaktivuloj.

Miriam Ramos: Populara kantistino, kiu ankaŭ prezentis repertuaron en Esperanto.

Ĉu legi, aŭ ne legi?

Dum niaj amikoj Calienes kaj Juan Ramón ordigis nian bibliotekon (ho, ve, kiom da niaj samideanoj uzas ĝin?), mi profitis la okazon foliumi denove malnovajn revuojn. Kompreneble entrudulo ĉiam riskas ion faligi aŭ malordigi, kaj mi ne estis escepto... Neatendita mansvingo faligis amason da libroj, el kiuj unu venis al mi kvazaŭ ploranta atenton...

Blovante la polvon de la libro, jen trezoro! Ne malpli ol *Hamleto*, *Reĝido de Danujo*, en traduko de Zamenhof mem! Jen unu el la unuaj libroj de mi legitaj kiam, okulbrila kaj fervora novico en Esperantujo, tute freŝa el la UK en Havano, 1990, mi alprenis la firman decidon ĝisfunde konatiĝi kun la esperanta literaturo. Mi rememoras, ke tiam estis acetebblaj juveloj kiel, ekzemple, *La Dresado de la Meĝero*, *Somermeznokta Sonĝo*, *Beletro*, sed ne el katedro, ktp., kiuj tentis el la bretaroj la pasantojn.

Ĉi-kaze temis pri la oka eldono, tiu surmerkata de Éditions Françaises d'Espéranto en 1964. Ververe temas pri juvelo. La teksto estas tiu de la 1a eldono (1894), elsarkigita je preseraroj, kaj ĉe kiu oni forigis la plimulton el la nenecesaj ŝanĝoj enkondukitaj de De Beaufront en la 2an eldondon (1902).

Kiam oni pensas pri tio, ke la lingvo ekzistis nur de kelkaj jaroj kiam Zamenhof surŝultrigis la taskon traduki ĉi tiun tragedion, la respekto al lia genio pligrandiĝas. Ne hazarde la tuŝŝtono de tradukarto estas traduki Ŝekspiron; ĉiuj grandaj poetoj kaj beletristoj almenaŭ iam en sia kariero mezuras la proprajn fortojn per traduko de Ŝekspirajo. Kaj la esperanta beletra mondo kompreneble ne estas escepto. Jen te-

mas pri William Auld kaj lia majstra traduko de la *Sonetoj*, jen pri la Kaloĉaj-a versio de *Somermeznokta Sonĝo*, jen pri multaj pliaj ekzemploj.

En la kazo de la tragedio *Hamleto*, la unua defio por la Majstro estis la ankoraŭ ne tute ekspluatitaj (ĉu oni iam alvenos al la limo?) nek provitaj fortoj kaj rimedoj de lingvo en, kial ne diri tion, infanaĝo. Fakuloj dubas. Ĉu la *Universala Vortaro* estis finkompilita antaŭ la apero de la traduko. La majstro konsciis pri tio, ke beletro estas la vojo al perfektigado de lia kreitaĵo, kaj instigis ĉiujn ne nur al kreado, sed ankaŭ al tradukado de bona literaturo. Fakte ne multaj konscias pri tio, ke tradukado estas eĉ pli malfacila lo originala verkado.

Oni supozas, ke Zamenhof baziĝis sur iu germana aŭ rusa traduko de la tragedio: li ne plene scipovis la anglan, kaj Waringhien dubas, ĉu la originala angla versio haveblis en sengrava urbeto. Ververe la afero ne tro gravas por literaturamanto; krom kelkaj ŝanĝoj nur kapteblaj de fakulo, la traduko respiegulas tion, kion Ŝekspiro deziris. Pruvo estas, ke postaj provoj (mi rememoras tiun fare de Newell, 1960) pale aperas antaŭ la Zamenhofa traduko. La versoj fluas, danke al licencoj lerte alprenitaj antaŭ la problemoj starigitaj de evitenda monotoneco, kaj vera vringado de ĉiu vortero.

La eldono plivaloriĝas per sufiĉe da piednotoj kaj klarigoj kiuj helpas la leganton kompreni ne nur la sencon de verseroj, sed ankaŭ la kialon de la elektoj.

TINEO

Hamleto, Reĝido de Danujo. Tragedio en Kvin Aktoj. Tradukis L. Zamenhof. Éditions Françaises d'Espéranto, Oka Eldono. Marmande, 1964.

Po-emo

– Nu, PIVulo, ĉu Vi povus helpi min? Oni petis min redakti kelkajn ekzemplojn je uzado de la prepozicio po, kaj en vero mi ne scias kiamaniere ĝin uzi. Neniam estis mi uzinta ĝin!

– Kaj mi devos solvi Viajn hejmtaskojn? Ek, venu, ni kune pensos. Alportu al mi tiun libron.

– Kiu libro estas tiu, PIVulo? Vi neniam montris ĝin al mi!

– Ne diru! Vi jam konas ĝin. Kaj cetero, oni antaŭ ne multe propagandis ĝin pere de Avanco... Jen. Kaj ververe Vi ne rememoras ĝin? Temas pri *Nuevo Método de Esperanto* de Fernando de Diego. Jen, Ĉi tie estas kelkaj ekzemploj. Voĉlegu.

– La gastoj trinkis po glaseto da vino... Ili donis po kvin dolaroj al ĉiuj...

– Tre bonkore...

– Ne ŝercu, PIVulo. Kion signifas tio?

– Nu, tio signifas, ke eble la gastoj ankoraŭ soifas... bone, ŝercojn for, ĉiu gasto trinkis glaseton. Nur unu. Kaj ĉiu el la bonŝanĉuloj ricevis kvin dolarojn. En la hispana "po" signifas "a razón de". Temas pri distribuo.

– Mi konstatas, ke en la ekzemploj oni metas nominativon post "po". Ĉu oni ĉiam faras tiel?

– Vere ne estas unuanimeco pri tio, sed la plej bona estas uzi nominativon. Post ĝi Zamenhof mem uzis akuzativon nur unufoje, laŭ Kalocsay, kvankam ŝajne li opiniis same bona la akuzativon post "po". Kalocsay dediĉis sufiĉe da spaco en sia *Plena Analiza Gramatiko* al "po", ĉu vi scias? Li eĉ proponis la uzadon de "poa": "ili trinkis poan glaseton", "ili ricevis poan korbon da

pomoj", kaj "poe": "la knaboj ricevis (ĉiam ricevis!) poe du pomojn kaj duonan", "tiuj studentinoj havis poe plurajn amantojn..."

– Diboĉulinoj, ĉu ne?

– La propono estas korekta, kvankam al mi aspektas iom peza, Sed ĉarme ekzota: por poe-zio aŭ po-emo, ĝi estus utila. Jen plia ekzemplo, eĉ pli komplika: "Mi donis po tri pomojn al po du infanoj".

– Do ĉiu duopo ricevis tri pomojn. Bone, mi jam komencis kompreni. Mi proponos ekzemplon. "la inspektoroj vizitis tri lernejojn po tage".

– Haltu tie! Tio estas eraro: devus esti "po tri lernejoj tage" aŭ "en ĉiu tago".

– Jes ja! Do mia bele elpensita ekzemplo iris rubujen... ĉu ne eblas, ke mi ankaŭ uzu tiun prepozicion elegante?

– Ne malesperu! Estas pliaj eblecoj. "Po" povas esti uzata ankaŭ prefikse. Tiukaze ĝi aldonas sian distribuan signifon: vendi pomalgrande (ni parolus pri "venta minorista" en la hispana), trinki pogute, pogutilo...

– Po... kio?

– Pogutilo. Tiun ilon, kiun oni uzas kun la celo elverŝi gutojn da medikamento, ekzemple.

– Mi komprenas. Kaj ĉu oni povus uzi ĝin ankaŭ adjektive? Mi do poponus "pokapa", do "pokapa enspezo..."

– Brave! Mi konstatas, ke finfine vi kaptis la ideon. Do, mi ĝisas. Atendas min klaso.

– Mi trovis plian ekzemplon! "La lernantoj sidos po du..."

– ...ĉe ĉiu tablo. Eble, se oni ankoraŭ ne alportis la novan meblaron!

PIVULO.




www.esperanto.net



21a – 27a de marto 2004
Havano, Kubo

**Kia Esperanto-movado
por Ameriko?**



Ciferecigis: Javier Ramos
@Radioamatoro